

Bonan...

Ĉiam estas agrable deziri al geamikoj kaj gekonatoj pozitivan jaron . Same pri esperanto ; ni esperas, he homoj interesigis pri ĝi, konsideros ĝin pozitive, eklernos ĝin, uzos ĝin...

La miraklo ne alvenos sola . Al ni la tasko konatigi la internacian lingvon, per ekzemploj kaj ne nur paroladoj, sed ankaŭ al ni la ebleco kaj plezuro uzi kaj utiligi ĝin . Ne nur kun gesamideanoj apudaj sed ankaŭ kun gesamideanoj de aliaj grupoj, de aliaj regionoj, de aliaj landoj .

Sur la antaŭa paĝo estas menciataj kelkaj rendevuoj . SFS volonte informos vin persone pli detale pri ĉiu el tiuj eventoj (kaj pri aliaj) . La lastaj numeroj montris, kiom interese estas vojaĝi al diversaj aranĝoj grupe. Espereble tiu tendenco plifortigos en tiu-ĉi jaro.

Eĉ hejme, speciale dum la nuna malvarma sezono, eblas sin prepari, sin plibonigi lingve, legante librojn, revuojn . Sur la paĝo 3a vidu kelkajn eblecojn . Poste, staĝoj en nia regiono (Vias, Sète) donos la okazon praktiki dum tuta semajno, same pri kongresoj enlande aŭ eksterlande. Ankaŭ postsomere estas aliaj okazoj paroli esperanton kun homoj de trans la limoj . Partoprenu kaj sciigu viajn spertojn pere de SFS !

Individue kaj izolite ni ne povas multe fari ; plurope certe multe pli . Pro tio la ekzisto de lokaj grupoj, de regionaj federacioj, de fakaj asocioj, de nacia kaj internacia asocioj . Bone ekzemple, se vi mem kontaktas vian lokan deputiton, regione ni povas kontakti la regionajn instancojn, naciskale la ministeriojn aŭ aliajn naciajn asociojn . Kune ni povas multon fari ! Eventuale konsideru la aliĝon al E^e-asocioj (vidu p. 3) . Sukcesan novan jaron !

...Jaron !

Sojle de nova jaro : au seuil de la nouvelle années... il est bon de prendre quelques résolutions !

- respecter la **date limite** indiquée sur chaque numéro . La date limite est la date extrême de réception de vos articles . Le rédacteur réserve une semaine pour taper le bulletin mais, bien que retraité, il a des rendez-vous et occupations en dehors de la période prévue . Cette fois encore, par suite d'articles reçus après la date limite, SFS vous parvient en retard et certaines informations (visite d'une Lituanienne à Béziers, abonnements et adhésions pour 2004) perdent un peu de leur actualité . Merci à ceux qui nous envoient leurs contributions dès que l'évènement est passé . Tio estas la bona metodo !

-envoyer des compte-rendus ou articles **récents** . Ce qui s'est passé il y a quelques mois perd beaucoup de son intérêt .

- vous n'aimez pas lire dans différentes revues les mêmes articles . Envoyez nous des articles **originaux**, que nous n'aurons pas l'occasion de lire ailleurs (sauf annonces d'évènements à venir) .

- toute occasion d'utiliser l'espéranto peut servir d'**exemple** à d'autres espérantistes (si vous accueillez des étrangers dans le cadre de « Pasporta Servo », ce que vous avez eu l'occasion de réaliser incitera peut-être d'autres à se joindre au réseau des gastigantoj ou de l'utiliser) et montrera à des non-espérantistes que l'espéranto sert aussi . N'hésitez pas à nous faire part de ce que vous avez fait ou tenté ! Il ne s'agit nullement de mise en avant mais d'information .

-penser à régler l'**abonnement 2004** . Il reste fixé à 6^E, ce qui couvre tout juste les frais ; il n'est pas interdit de verser davantage . SFS, « Sudfrancia Stelo », compte un rédacteur (Jean Hénin), dont l'adresse est en dernière page, un chargé de l'impression et de l'envoi (André Capus, 15 Rue des Frères Platter 34000 Montpellier) et une trésorière (Lucette Négron, 40 Chemin des Amandiers, 34400 Lunel) . N'envoyez pas votre chèque au rédacteur mais à la trésorière (à l'ordre de « Fédération d'espéranto du Languedoc-Roussillon » - CCP 956-28 P Montpellier) et pas directement à votre banque ou CCP, car la trésorière ne saura pas de qui vient le versement, ni son adresse .

De même, communiquez tout changement d'adresse à André Capus . Merci de nous faciliter la tâche et n'attendez pas plusieurs rappels pour vous acquitter de la somme modique de 6^E . Si vous faites partie d'un groupe, votre trésorier encaissera et nous enverra les cotisations groupées .

Le rédacteur vous prie de l'excuser de quelques perturbations (fax et internet) apparues entre mi-novembre et mi-décembre et réglées depuis (espereble !) . Si vous n'avez pas reçu de réponse à un message envoyé pendant cette période, l'explication se trouve là ! Cette année, le matériel neuf a promis de ne pas tomber en panne ...

Bonan legadon de SFS !

Anticipan dankon pro viaj rimarkoj, sugestoj, kontribuoj, raportoj, ktp !

P.S. : un abonnement gratuit d'un an est servi aux personnes qui commencent l'étude de l'espéranto et que vous voudrez bien nous signaler .

Abonnements 2004

3

esperanto
France

Espéranto-France, 4bis rue de la Cerisaie, FR-75004 PARIS
Tel : 01 42 78 68 86 • Fax : 01 42 78 08 47 •

| Nom de la revue | Nombre par an | Tarif |
|--------------------------------------------------------------|---------------|-----------|
| • Esperanto (revue de UEA) | 11 n° | 34€ |
| • Fonto (revue littéraire) | 12 n° | 30€ |
| • Franca Katolika Esperantisto | 4 n° | 10€ |
| • Heroldo de Esperanto | 17 n° | 32€ |
| • Juna Amiko (revue interscolaire) | 4 n° | |
| - un exemplaire | | 12€ |
| - de 2 à 4 ex. à la même adresse | | l'un : 9€ |
| - à partir de 5 ex. à la même adresse | | l'un : 7€ |
| • Komencanto (international, de Russie) | 6 n° | 15€ |
| • Kontakto (revue éditée par TEJO) | 6 n° | 20€ |
| • La Domo (revue des professions et services) | 4 n° | 5€ |
| • La Kancerkliniko (politique, culture, etc.) | 5 n° | 20€ |
| • La Ondo de Esperanto et son supplément littéraire (Russie) | 11 n° | |
| - voie terrestre | | 25€ |
| - voie aérienne | | 29€ |
| • Le Monde de l'Espéranto (bilingue) | 6 n° | 30€ |
| • Le Travailleur espérantiste | 6 n° | 19€ |
| • Literatura Foiro | 6 n° | 30€ |
| • Litova Stelo : voie terrestre | 6 n° | 14€ |
| - voie aérienne | | 20€ |
| • Monato (Magazine international) voie terrestre | 11 n° | 44€ |
| - voie aérienne | | 49€ |
| - Internet | | 26,40€ |
| - La Jaro (agenda édité par Monato) l'exemplaire | 1 n° | 5€ |
| • Ret-info (ex "Eventoj") abonnement Internet | | 19€ |
| • Rok'Gazet' (musique) 1 numéro/an | pour 3 n° | 15€ |
| • Verda Lupeo/Fenikso (philatélie) | 4 n° | 16€ |
| | | Total : |

Les titres ci-dessus doivent être commandés à France-Espéranto, ceux de droite à UEA -Universala Esperanto Asocio- Nieuwe Binnenweg 176, 3015BJ Rotterdam - Nederlando .

N'oublions pas « Esperanto-Info », rédigé et imprimé dans notre région . Cette revue (6 numéros par an, en couleurs) est tout en français et présente la langue internationale . Tarif : 20[€] (soutien 30[€]) .
Rédacteur : Francis Bernard Col de Coperlac 48210 Mas Saint Chély .

Cotisations Esperanto-France et UEA :

E* -France :

Membre actif abonné, reçoit Okazas et Le Monde de l'E*, code FMA : 55[€]
(Etudiant /chômeur : code FME : 35[€])

Membre actif, non abonné : code FSM : 33[€] (étudiant/chômeur, FSE 20[€])

Membres actifs couple (1 abonné, 1 non abonné) : code PK1/2 ; 85[€]

Espéranto-Jeunes (moins de 30 ans)

Membre actif abonné E*France et E*Jeunes : JMA 55[€] (étudiant/ch : 35[€])

Membre actif exerçant une profession (reçoit les revues de E*Jeunes) JSM 30[€] (tarif réduit étudiants, scolaires, chômeurs : JMM 15[€])

UEA : Membro UMJ (reçoit le Jarlibro) 22[€] / UMG (parto de Jarlibro) 9[€]

Membro UMA (Jarlibro + revue Esperanto) 54[€]

ABONTARIFOJ 2004

de la Lidroservo de UEA

(prezoj en eŭroj)

| Revuo | n-roj jare | jara abono |
|-----------------------------------------------------------|------------|------------|
| Boletín (hispana) | 5 | 28.00 |
| Brazila Esperantisto (aere) | 4 | 18.00 |
| Bulgara Esperantisto | 4 | 12.00 |
| Dia Regno (KELI, aere) | 6 | 18.00 |
| Esperantisto Slovaka | 4 | 20.00 |
| Esperanto aktuell (germana) | 6 | 20.00 |
| Esperanto (UEA) | 11 | *32.00 |
| Esperanto, L' (itala) | 9 | 26.00 |
| Esperantolehti (finna) | 6 | 15.00 |
| Esperanto sub la Suda Kruco (aŭstralia-novzelanda, aere) | 6 | 24.00 |
| Espero Katolika (IKUE) | 6 | 29.50 |
| Espero, La (sveda) | 6 | 20.00 |
| Fonto (literatura, aere) | 12 | 35.00 |
| Gazeto, La (kultura) | 6 | 29.00 |
| Heroldo de Esperanto | 17 | 32.00 |
| aerpoŝta aldono | | 12.50 |
| ICEM-Espéranto (Freinet-pedagogio) | 4 | 18.50 |
| Informilo por Interlingvistoj | 4 | 7.00 |
| Internacia Pedagogia Revuo (por instruistoj) | 4 | 18.00 |
| Jaro, La (agendo, aere) | 1 | 6.00 |
| Juna Amiko (por lernejoj) | 4 | 12.00 |
| Kancerkliniko, La (ajnista) | 5 | 20.00 |
| aerpoŝta aldono | | 3.00 |
| Komencanto (por komencantoj) | 6 | 15.00 |
| Kontakto (TEJO) | 6 | *19.00 |
| Kosmos (filozofia) | 2 | 8.00 |
| Language Problems and Language Planning (por institucioj) | 3 | 58.00 |
| Literatura Foiro (kultura) | 6 | 146.00 |
| aerpoŝta aldono | | 30.00 |
| Litova Stelo | 6 | 8.00 |
| aerpoŝta aldono | | 14.00 |
| Medicina Internacia Revuo (aere) | 3 | 6.00 |
| Monato (novajmagazino) | 11 | 13.60 |
| aerpoŝta aldono (reta versio) | | 44.00 |
| Monde de l'espéranto, Le | 6 | 5.00 |
| Norvega Esperantisto | 6 | 26.40 |
| Ondo de Esperanto, La | 12 | 30.50 |
| aerpoŝta aldono | | 11.50 |
| Oomoto (religia/kultura, aere) | 2 | 25.00 |
| Scienco kaj kulturo | 6 | 4.00 |
| Sennaciulo/Sennacieca revuo | 12 | 13.80 |
| Simpozio (filozofia) | 2 | 30.00 |
| Starto (ĉeĥa) | 4 | 55.00 |
| TEJO tutmonde | 4 | 9.00 |
| Tempo (kroata) | 4 | *10.00 |
| | | 11.40 |

* Abonprezoj de UEA-revuoj varias laŭlande. Konsultu la kotiz-tabelon de UEA.

Por ĉiuj gazetoj la abonantoj en Eŭropa Unio aldone pagas la imposton de 6%.



VIVO DE LA GRUPOJ

BEZIERS

Venontaj kunvenoj : sabate, je la 14a horo en MVA (Maison de la Vie Associative)
la 10an de januaro : preparo de la akcepto de Litovino , poste ni manĝos la 3reĝan kukon ;
la 14an de februaro : ĝenerala kunveno ;
la 13an de marto ;
la 3an de aprilo .

Vizito de Litovino : Grazina Opulskiene prelegos pri sia lando en MVA merkredon la 14an de januaro posttagmeze ekde la 14a ĝis la 17a horo . Tiel, tiuj, kiuj ne loĝas en Béziers, povos facile rehejmiĝi . *Ni esperas, ke vi venos multaj . Estas bona okazo por praktike uzi esperanton .*

Zamenhof-Tago : Ni festis tiun tagon la 13an de decembro . Ĉeestis 35 personoj, ne ĉiuj esperantistoj Pluraj venis de proksimaj urbetoj kaj ankaŭ de Lozère, Perpignan, Montpellier . Ĉiuj zorgis por gajigi la feston, antaŭ kaj post la manĝo en restoracio . Eĉ komencantinoj ludis skeĉetojn . Ni dankas ĉiujn geaktorajn kaj muzikistinojn, ludintajn en la posttagmezo . Gratulojn al montpellieranojn, kies partopreno multe helpis nin . La ĉefa teatraĵeto estis verkita de Jean-Pierre Peray . Sincerajn dankojn kaj gratulojn al ĉiuj .

NDLR : Gratulojn ankaŭ al JPP pro la pretigo de belaj koloraj programoj . Ni ne kaŝos la titolon de la « farsa dramo en dekunu scenoj » : Ĉu la mano ĉepugen aŭ survangen ?...nek la varman akcepton kun « aperitivo malavare proponita de CBE »...

Printempa staĝo : la programo estas nun preta (vidu sur paĝoj 8/9). La staĝo okazos kiel ĉiujare en « La Dragonnière », proksime de Vias, de la 19a ĝis la 26a de majo .

Z-tago(j) : Kiel pasintjare, la Z-tagon ni plurfoje festis (en Montpellier, Béziers kaj Avignon). En Montpellier ni akceptis kun granda plezuro niajn geamikojn el Béziers, kiujn niavice ni vizitis la sekvantan sabaton . Sur la kajo de la stacidomo de Montpellier, ni estis 8 gesamideanoj, kiuj entrjniĝis al Béziers.

Komprenoble ni profitis la okazon por paroli en esperanto, tiel sur la kajo, kiel en la kupeo . Tio estas nia maniero aŭdigi kaj konatigi esperanton . La tagmanĝo en Béziers ĉiam bongustas kaj la etoso ĉiam estas ĝoja .

Post tiuj tri Z-tago, kie ni ludis teatraĵetojn, la Kristnaskaj ferioj estis bonvenaj por iom ripozi . Tamen, mi devas ankaŭ konfesi, ke mia koro ĝojiĝis kaj varmiĝis ĝis la fino de vintro .

J.B.

MONTPELLIER :

Niaj lastaj kunvenoj :

La 11an de oktobro : 15 partoprenintoj . Leo Lentaingne prezentis Maria, « novbakitan » esperantis-tinon kaj parolis pri siaj renkontoj kun eksterlandanoj . André Capus rakontis pri restado en Jugoslavio . Estis tre interese aŭdi niajn « majstrojn » . Hélène kaj Christian resumis sian laboron por la disvastigo de nia lingvo en sia lernejo : kreado de klubo, kontaktoj kun lernejoj en aliaj landoj . Ni decidis pri la **datoj de la venontaj kunvenoj** : **15a de novembro, 6a de decembro, 10a de januaro, 7a de februaro, 17a de marto, 15a de majo** . Kiel kutime : **MPT L'Escoutaire, je la 10a horo** (akurate !).

La 15an de novembro : partoprenis 16 personoj, 4 senkulpiĝis . Ni akceptis du vizitantojn, Patrick, esperantiston, kiu multe vojaĝas en suda Francio kaj lian amikon, neesperantiston sed mondĉivitanon . Nia prezidantino, Annick Tora, multe laboris por la preparado de budo en la « dusemajno de la Tria Mondo », okazonta en la domo « Espace Luther King » je la 19a de novembro (vidu apartan raporton). Pro la intereso de la geknaboj de la E°-klubo de la kolegio Sta Tereza de Lunel, nia kultura centro abonigos la klubon al la revuo « Juna Amiko » . AT memorigis pri la signifo de la baldaŭa Zamenhof-tago . Du geamikoj, partoprenintaj en turisma semajno en Sta Suzanna (Katalunio), raportis tre favore pri la evento .

La 6an de decembro : Z-tago . Partoprenis 18 homoj, vizitis nin 3 gesamideanoj el Béziers . Ni estis feliĉaj gastigi ilin, ĉar la etoso estis tre familia . Pro la forpaso de nia granda amiko Armand Diez, ni silentis dum momento, por honori lin . Poste oni ludis skeĉojn, oni deklamis poemojn kaj sekvis... «festeneto» . Ni rendevuis por la nova jaro .

Memore al nia amiko Armand Diez :

La 27an de novembro subite forpasis pro kormalsano nia kara klubano Armand Diez . Eksprofesoro de liceo, li emeritiĝis en 1967 kaj rapide eklernis esperanton . Li fariĝis fidela membro de nia grupo kaj gvidis kursojn . Bedaŭrinde, dum la lastaj jaroj, sinsekvaj gravaj familiaj eventoj kaj la morto de lia edzino atingis lian fortan sintenon . Kvankam li ofte ne montris sian ĉagrenon, lia sanstato pli kaj pli difektiĝis ĝis tiu subita morto . Apud la familianoj, multaj membroj de la grupo partoprenis la funebran ceremonion .

Vortoj diritaj de amiko dum la funebro : « Hodiaŭ niaj koroj ploras .

Nia Amiko Armand Diez subite forpasis...Mi ne povas kredi, ke nur antaŭ kelkaj tagoj, kun li, ni parolis pri la baldaŭa kunveno de la esperantista grupo, kies tagordo devus esti ĝojoplena kun la antaŭvidita vizito de la samideanoj el Béziers .

Por nia amiko, Esperanto estis ĉiam la espero : espero por la progreso de la internacia lingvo, espero de pli granda solidareco inter la popoloj, espero por la paco, la komprenemo kaj toleremo .

Kiu ne rimarkis, ke nia samideano estis ĉiam atentema al aliuloj, kompatinda al la malfeliĉuloj, al la sanstato de konatuloj...kaj ĉiam dirante optimismajn vortojn ? Tia estis nia amiko malgraŭ la batoj de la sorto, kiuj plurfoje atingis lin . Ĉiuj el ni konas tiujn gravajn eventojn .

Mi diras nur pri unu el la lastaj . Antaŭ nelonge, post plurjara malsano, lia kara edzino Simone forpasis . Ek de tiu momento, malgraŭ lia forta sinteno, nia amiko malkuraĝiĝis .

Iom post iom, lia sanstato malboniĝis ĝis la subita kaj fatala koratako .

Al lia filo Andreo, lia filino Nicole, lia bofilino, liaj nepoj, liaj nepinoj kaj la tuta familio, ni diras niajn sincerajn kondolencojn .

Adiaŭ amiko nia...Hodiaŭ niaj koroj ploras...»



Dusemajno de la triaj mondoj

Invitita de la estrino de la « Domo de la triaj mondoj », la grupo de Montpellier partoprenis en la programo de la 14a dusemajno, kies temo estis « internacia solidareco kaj pluralaj kulturoj » . Estis en la programo rondaj tabloj, debatoj, ekspozicio, atelieroj, teatro, sporto...en diversaj lokoj de la urbo . La « Domo » helpas gestudentojn el 40 landoj, kiuj loĝas en M, kaj organizas diversajn aranĝojn tra la jaro .

Unu vespero de la dusemajno estis dediĉita al la deklamado de poemoj en diversaj lingvoj, inter kiuj esperanto ; ĉeestis centoj da gejunuloj . Estis instrue renkonti homojn el multaj landoj kaj malkovri poemojn el diversaj partoj de la mondo . La prezento de la speciala numero de « Le Monde de l'espéranto » pri solidareco estis plej oportuna . Ni lasis dokumentojn, kiuj prezentas esperanton, kaj kiuj estas nun je la dispono de la membroj de la « Domo », al kiu nia asocio baldaŭ aliĝos .

Venontfoje ni faros eĉ pli bone, ĉar nun ni konas la lokon kaj la respondeculinon . Eble intertempe la semoj rezultigos fruktojn .

14^{ème} Quinzaine des Tiers Mondes

SOLIDARITÉ INTERNATIONALE

ET

CULTURES PLURIÉLLES

Du 15 au 30 Novembre 2003

Maison des Tiers Mondes et de la Solidarité Internationale
ESPACE MARTIN LUTHER KING
27 boulevard Louis Blanc - 34000 MONTPELLIER
Tél. fax 04 67 02 13 42



Ville de
Montpellier



La Gazette



PRADES

Raportoj aperintaj en la gazeto « L'Indépendant » de la 19a de novembro kaj 26a de decembro. Gratulojn al Christian Pinard (la unua maldekstre sur la foto), ne nur pro la raportoj kaj inici-
-atoj, sed ankaŭ pro tio, ke samtage (la 13an de decembro) li sukcese trapasis du ekzamenojn, la ateston pri lernado kaj la ateston pri prakti-
-ka lernado. Bonan kuraĝon por la sek-
-vonta ekzameno !




C'est sur la place de Prades que le groupe d'espérantiste s'était donné rendez-vous pour ce week-end d'échanges inoubliables. Un week-end rythmé de visites et moments conviviaux pour les espérantistes.

"Trilinguisme de base"

M. Germain Pirlot d'Ostende (Belgique) suggère : Bien que je ne sache pas lire correctement le catalan, je me suis toujours intéressé à votre région, à son histoire, à sa littérature depuis un séjour à Perpignan où un collègue espérantiste, M. Jean Amouroux, m'a appris à aimer son "pays". Il m'envoie régulièrement des articles de L'Indépendant (dont je visite parfois le site). Par ailleurs, je reçois régulièrement le périodique Lo Lugarn qui, grâce à des articles bilingues "français-occitan" m'amène à comprendre plus ou moins un texte en catalan. Aussi ai-je été très intéressé par l'article de Pere Verdager en catalan paru récemment. Il y est question de l'espéranto : "I fins i tot es va posar a l'esperanto, que anava a ensenyar pels vilatges amb els companys, perquè era la llengua internacional per excel·lència que havia de permetre als treballadors de tot el món d'unirse". Quotidiennement depuis plusieurs années, j'utilise l'espéranto avec des personnes de toutes nationalités, de toutes classes sociales, de toutes obédiences religieuse, politique et philosophique, sans pour cela négliger la pratique d'autres langues. C'est la raison pour laquelle je pense que, dans un contexte européen, la communication entre les citoyens serait largement facilitée si l'on pouvait encourager un trilinguisme de base : langue régionale (ex : l'occitan) ; langue nationale (ex : le français) ; langue internationale neutre, relativement facile à maîtriser, comme l'espéranto (www.esperanto.net). Libre alors à chacun d'étudier le plus possible de langues selon ses capacités intellectuelles, ses intérêts personnels ou ses besoins professionnels.

La "Zamenhofa festo" des espérantistes

Dernièrement, les espérantistes conflentois ont organisé leur première fête en l'honneur de Zamenhof, initiateur de l'espéranto. En effet, c'est le 15 décembre, jour de sa naissance, qu'est honoré dans le monde entier par les espérantistes le docteur Zamenhof. L'occasion pour tous de rendre hommage à cet homme qui a forgé cet outil de communication qu'est la langue internationale espéranto. Ils rappellent donc à tous qu'une nouvelle session d'initiation démarre en janvier.



Les espérantistes ont rendu hommage au docteur Zamenhof.

Les inscriptions sont ouvertes. Et "Ghis la venonta jaro !" (à l'année prochaine !). Renseignement

auprès de Christian Pinard au 23 rue de l'Hospice, tél. 04 68 05 24 41.

"Et si on relançait l'espéranto ?"

Jean-Pierre Tavernier de Perpignan, propose. L'Europe, élargie à 25 : une trentaine de langues officielles, plus d'une centaine de dialectes, une vraie tour de Babel. Bien entendu, il n'est pas question de toucher aux langues nationales et j'espère bien que pendant de nombreuses générations, nos descendants resteront francophones. En attendant, il va falloir se comprendre.

Alors l'anglais (ou plutôt le "business slang américain" qui n'a plus rien de commun avec la langue de Shakespeare) ou une langue commune européenne applicable à tous les actes qui concernent chaque citoyen de l'UE ?

Je pense que le rêve de Zamenhof reprend tout son sens et toute sa valeur. Aussi, pourquoi ne pas exiger de Strasbourg et Bruxelles qu'une version en espéranto de tous les textes soit obligatoire au niveau des instances européennes, que soit incluse dans les assemblées une traduction simultanée dans cette langue pour tous, que le système éducatif de chaque État membre incorpore cette formation ?

Ce pourrait être un beau rêve : 25 jeunes issus de pays différents parlant d'une même voix de leur avenir commun, aptes à se comprendre. Et comme, dans le monde entier, une minorité le parle, une langue de paix qui pourrait s'étendre.

Leteroj de legantoj ankaŭ aperis en "L'Indépendant" de la 9a kaj 10a de decembro, du tagojn sinsekve ! Kiu leganto ne rimarkis ?

DISE TRA LA REGIONO ALES

De tiu urbo ni ricevis « novaĵojn el iu fajro, kiu sub la cindro supervivas », fakte de nia samideano Henri Vigne . Ĉar li kutimas vintrumi en suda Hispanio, kie la lokuloj ne povas bone komuniki kun la feriantaj eksterlandanoj nek la feriantoj komuniki kun la lokuloj, ankaŭ pro iu lingvo-problemo, venis al li la ideo prepari foliojn (du estas pretaj, en la franca kaj la kastilia) por proponi al la du kategorioj eklerni esperanton . Ni scios printempe, ĉu la ideo progresis kaj havis kelkajn rezultojn.

ARLES

Fine de la jaro nia veterano kaj amiko Gustave Blary festis sian naŭdekan datrevenon . Li bedaŭras, ke en la klubo de ĝemeliĝoj estas instruataj pluraj lingvoj kaj ke, kvankam esperanto estis je la bazo de ĝemeliĝo kun Italio, ne estas volontuloj por lerni la internacian lingvon .

NDLR : ĉu la homoj tie scias, ke pere de la internacia lingvo ili povus viziti la diversajn ĝemeligitajn urbojn ? Eble la okazigo de la nacia kongreso en La Roque d'Anthéron povus utili por iom reklami por esperanto . Neniam malesperi !

AVIGNON

Tie male viglas grupo . Komence de la nova lernoĵaro la grupo aperigis en la gazeto « La Provence » artikolon kun foto de la grupo (tro longan por nia bulteno !) kaj paragrafo, kiu montras kiel la lokaj esperantistoj uzis esperanton . Imitinde, se vi kapablas kunigi la grupanojn komence de la jaro aŭ okaze de ĝenerala kunveno .

■ Langage universel

Les espérantistes défient l'avenir



Les Espérantistes lors de la réunion générale de rentrée

(Photo J.R.)

LOZERE

Post terura incendio somere, alia neatenditaĵo trafis Francis kaj Monique Bernard . Militista aviadilo (Mirage) falis proksime de ilia domo...sen la pilotoj ! Niaj ĝeamikoj estis intervjuitaj de la gazetoj, de la televidkanalo FR3...Post la ŝoko, ili retrovis energion por finpretigi « Esperanto Info » (vidu sur paĝo 3) . Feliĉe, ke ili vivas sub verda stelo...

P-O : CERET

Kiel anoncite sur la unua paĝo, la Katalunoj de ambaŭ flankoj de la limo kunvenos en Céret fine de oktobro . Jen la informoj aperintaj en « Kataluna Esperantisto » de decembro . Notu la datojn, ĉar estos bona okazo partopreni kongreson sen krokodiloj...

La 32a Kataluna Kongreso de Esperanto okazos en Ceret (Vallespir, Nord-Katalunio) de la 30a de oktobro ĝis la 1a de novembro.

La kongreso festos la centjaran jubileon de nia esperanto-movado, kies unuan nacian organizon. Aplec Esperantista de Catalunya, fondis en Ceret Paul Berthelot en novembro 1904. Ankaŭ en Ceret estis eldonitaj la tri numeroj de la bulteno de la asocio. *Espero de Katalunjo*.


Kvankam oni antaŭvidas kelkajn prelegojn kaj la prezenton de jubilea libro pri la pionira esperanto-movado en nia lando, la kongrestemo ne estos dediĉita al historiaj aferoj. Oni elektis paroli ĉefe pri "novaj kulturaj defioj", t.e. pri la kultura buntiĝo de la landoj en nia regiono.

La aliĝilo estos distribuita kun nia venonta revuo, en marto.

TULUZO

Nia amiko Floreal Martorell, kiu respondecas pri Vinilkosmo –eldono de muzikproduktaĵoj : diskoj, kompaktdiskoj - daŭre pliriĉigas la kolekton de registraĵoj . Jen kelkaj el la lastaj referencoj :
 VKKD 56 : Oraj kantoj : « Ni renkontiĝos » . Inter la dekdupersona teamo de kantistoj Mikaelo Bronŝtejn, kiun ni renkontis en Béziers .
 VKKD 57 : Oraj kantoj (vol.2) : « Amata lando » . Kun la samaj kantistoj .
 VKKD 58 : Oraj kantoj (vol. 3) : "La lingvo por ni" 22 kantoj el 14 landoj , kun iom reduktita teamo .
 VKKD 53 : Kompilo de elektronika muziko .
 Por mendi : Vinilkosmo 31450 Donneville aŭ www.vinilkosmo.com/
 Vinilkosmo ankaŭ vendas la KD de la usona ĵaz-trumpetisto Rick Braun, kiu furoras nun en Usono kun la titolo « Esperanto »...

Le Cercle Biterrois d'Espéranto



a le plaisir de vous inviter à son 21° stage de printemps
du 19 au 26 mai 2004 (Ascension)

Domaine de la Dragonnière★★★★(entre Béziers et Agde)

Nouveau pour 2004

Pour être au plus près des stagiaires, afin qu'ils profitent le mieux possible de leur séjour linguistique, et suite à la demande du groupe de conversation, trop important l'an dernier pour une seule enseignante, nous avons décidé de scinder ce grand groupe en petits cercles de 4 ou 5 personnes, afin que les stagiaires aient plus de temps et puissent plus souvent s'exprimer en cours. Pour situer exactement votre niveau d'étude en espéranto, il est souhaitable que vous répondiez au questionnaire joint, ceci pour connaître le cours auquel vous serez affecté. Nous vous remercions de votre collaboration.

Les Organisateurs

FRAIS DE SEJOUR

A) - Adhésion : 40 € jusqu'au 1er mai 2003
ou 50 € après date ci-dessus.
Adhésion gratuite pour les moins de 25 ans

B) - Pension complète pour la semaine
245 € par personne

Total (A+B) 245 + 40 = 285 € avant le 1^{er} mai
245 + 50 = 295 € après le 1^{er} mai

Acompte : 80 € - inclus l'adhésion - p. pers. avant le 1^{er} mai
: 90 € - inclus l'adhésion - p. pers. après le 1^{er} mai

Possibilité de camper

Place camping : 12 € Repas 11€50

Libeller le chèque ou le mandat postal au nom de:

CERCLE BITERROIS D'ESPERANTO

C.B.E.

Comment se déroule le stage

La journée se passe d'une façon harmonieuse pour que les stagiaires ne soient pas trop fatigués par l'étude de la langue. Nous prenons soin de vous !

3 cours sont prévus : débutants, conversation (voir : "Nouveauté du stage") et cours supérieur.

Les cours ont lieu le matin et fin d'après midi. Le déjeuner terminé vous avez le choix entre une bonne sieste ou de suivre une activité alternative : promenade, visite ou autres passe-temps.

Une excursion libre est prévue en milieu de semaine.

Les soirées sont destinées à la distraction : conférence, sketches, téléfilms (une exclusivité du groupe), jeux etc. Les stagiaires sont cordialement invités à participer à ces soirées (n'hésitez pas, nous sommes en famille).

Les repas sont copieux, les chambres confortables (tout le confort minimal désiré).

Voilà ce que l'équipe du stage, toute dévouée, propose à votre intention.

Il est expressément intéressant de participer à un stage pour se bien préparer à une Europe forte, (bientôt 25), car après l'EURO ne pourrait-on pas prévoir l'entrée de l'ESPERANTO dans l'Europe de demain ? Nous avons besoin d'une langue pont, commune à tous, pour ne pas détruire les richesses de nos langues nationales par un impérialisme linguistique.

Christian HERBETTE

22, ZA Le Bousquet

34310 MONTADY

Tel 04 67 21 86 61

Retadreso

Chrizo@worldonline.fr

Ou

C.B.E

9, rue Georges Picot

34500 Béziers

Tél./ Fax 04 67 31 13 18


RENKONTOJ

Sur la unua paĝo estas menciataj kelkaj rendevuoj en la venontaj monatoj . Speciale substrekindaj estas la 21a staĝo/semajno de **Vias en Majo** (detaloj sur paĝoj 8 kaj 9), la 30a semajno/staĝo de **Sète en Aŭgusto** . Pri tiu lasta vi trovos informojn en la venonta bulteno, sed ekde nun vi povas ricevi faldfolion en esperanto aŭ la franca de SFS aŭ de Espéranto, Culture et progrès 5, Rue du Docteur Roux, 34090 Montpellier (tel/fakso 04 67 54 15 43) aŭ rete konsulti <http://perso.wanadoo.fr/nikolao/esperanto.html>



NACIA KONGRESO (E° France) en La Roque d'Anthéron (19-24 V)

Ĉar ĝi okazos proksime de nia regiono –vidu la ĉi-postan mapeton- malfeliĉe je la samaj datoj kiel la staĝo de Vias, kial ne antaŭvidi partoprenon ? Informilo/aligilo estas haveblaj ĉe SFS . Jen la provi-zora programo . Notu, ke estos pluraj interesaj ekskursoj, gvidotaj de la grupanoj de Marsejlo, Aix kaj Avignon . Pri loĝado, krom hoteloj kaj tendumejoj, ĉambroj ĉe privatuloj, estos ankaŭ loĝebleco en la ferivilaĝo La Baume . Tiu ferivilaĝo konsistas el dometoj por kvar/kvin personoj, kun du ĉambroj, kiuj enhavas du unupersonajn litojn, manĝoĉambro, kuirejo ekipita, duŝejo, necesejo . Oni povas mendi la tutan domon, nur unu ĉambron aŭ unu liton . Por la manĝoj estos ebleco en la ferivilaĝo, eĉ por tiuj, kiuj loĝos aliloke (aŭ en la vilaĝo).

Atentu, ke la prezoj iom plialtiĝis por 2004 (decido de la urbestro), detaloj en « Okazas » de januaro



| | matene | postagmeze | vespere |
|--------------------|---------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------|---------------------------------------------------------------------|--------------------------------------------|
| merkredon la 19-an | | Akcepto de la partoprenantoj en La Baume Prelegetoj (**) | Folkloro vespero |
| ĵaŭdon La 20-an | Aktivulaj laborgrupoj : varbado, eksteraj rilatoj, interasocia kunlaboro, surloka informado, instruado de esperanto... | Prelego « La Valdanoj » Vizito de la muzeo en La Roque | Akcepto en la urbodomo Honora aperitivo |
| vendredon la 21-an | Ekzamenoj (*) Tuttaga ekskurso en Marseille Ekzamenoj (*) | Oficialaj kunvenoj de diversaj asocioj : GEE, JEFO, FEI, FKEA... | Koncerto kun JoMo |
| sabaton la 22-an | Kunsido UFE Vizito de la vilaĝo | Membrokunveno de Esperanto-France Komitatkunsido de UFE | Teatra vespero |
| dimanĉon la 23-an | Komitatkunsido de UFE Pieda promenado en arbaro apud La Roque | Ekskurso al Aix-en-Provence | Vespero de la talentuloj |
| lundon la 24-an | Ekskurso al Avignon | | |



SAT-AMIKARA KONGRESO en VENDEO (La Roche-sur-Yon 10-12 IV)

Post la mediteranea marbordo en Cap d'Agde lastjare, Vendeo akceptos la venontan kongreson. La Roche-sur-Yon estas urbo kun kvindek mil loĝantoj, kiu fariĝas 200-jara ĉi-jare. La urbo estas ĝemelita kun 5 urboj kaj subskribis paktojn de amikeco kun du pliaj. Ankaŭ okazas ĉiujare internaciaj renkontiĝoj (Latitudes); la urbo havas unu Zeo-n, nome trafikcirklo kun la nomo Dro Zamenhof. La kongresejo estos la liceo Pierre Mendès-France, kie estos malmultekosta tranoktebleco (20 kvarlitaj ĉambroj), aldone al la apuda moderkosta hotelo Kyriad.



La simbolo de La Roche-sur-Yon estas pentagono pro tio, ke la urbo estis planita laŭ tiu geometria formo. En du jarcentoj la nomo de la urbo ŝanĝiĝis sepfoje, depende de la reĝimoj. Jomo, kiun oni ne plu prezentas, estos denove videbla kaj aŭskutebla. Ekskursoj estas planitaj al la nacia ĉevalbredejo kaj tuttage al la insulo Noirmoutier.

Nova gazeto: Post « *Le Monde de l'Espéranto* » de France-Espéranto, Sat-Amikaro disponas nun ankaŭ pri belaspekta gazeto nomita « *La Sago* » (La Sat-Amikara Gazeto kompreneble) Kovrilpaĝa slogano: *Espéranto: vers une culture sociale sans frontières*. La gazeto estas parte en la franca, parte en esperanto kaj parte en ambaŭ lingvoj.

Abono al gazeto (sen aliĝo al Sat-Amikaro): 29[€]; Normala kotizo kun la gazeto: 32[€]
Sat-Amikaro, 134 boulevard Vincent Auriol 75013 Paris.

EUROP-UNIA KONGRESO en BILBAO (25-29 Aŭgusto)

Jen internacia kongreso „je niaj pordoj“ en bela regiono facile atingebla de nia regiono.

La kongresa temo estos „Eŭropa Unuiĝo: Esperanto por multlingva mondo“. Ne nur lingva politiko estos en la programo. La kongresa semajno estos plenplena de eŭskaj muziko kaj lingvo, teatraĵo, ekskursoj boate, vizitoj al la moderna muzeo Guggenheim, promenadoj tra Bilbao kaj ĉirkaŭaĵo, pacmuzeo. Eĉ la eŭska parlamento malfermos siajn pordojn por esperantistoj.

« *Viajes El Corte Inglés* » estas la peranto por hoteloj tri-kaj kvar-stelaj (ĝis la fino de majo); en Colegio Mayor Deusto estos disponeblaj 100 unulitaj ĉambroj kun banejo kaj necesejo (tranokto kun matenmanĝo 38[€], 215[€] por la 6 noktoj. Nepre rezervi antaŭ la 15a de aprilo. Por gejunuloj loĝeblecoj en junulgastejo 45 minutojn piede de la kongresejo aŭ en kampara junulgastejo pli malproksima kaj pli malmultekosta (nur 8[€] por la tranokto). *NDLR*: Ekzistas ankaŭ unu hotelo « *Formule 1* » en tiu urbo sed pro la datoj kaj la muzika «semajno» necesas rezervi frue.

UNIVERSALA KONGRESO EN ĈINIO (Pekino: 24-31 Julio)

Jes ja, la lando estas malproksima kaj konsekvence la vojaĝo multekosta sed kia aventuro! Ĉinio vekiĝas (kiel diris iu famulo) kaj certe estas la momento viziti ĝin antaŭ la Olimpikoj en 2008. Se vi ŝatus partopreni, sciu, ke E^o-France organizas grupvojaĝon kun loĝado en komforta 4stela hotelo, proksima de la kongreso (ne malutile pro la temperaturoj tiam) kaj vojaĝo septaga kun kompleta pensionprezo kaj vizito de urboj Xian, Guilin, Shanghai, Sushou... Kalkulo kun 2500[€] (la vojaĝo valoras tiun sumon). Tuj ekŝparu!
Se vi volas nur iomete informiĝi kaj revii... hejme, jen kelkaj partoj el la unua kongresbulteno.

Pekino estas ĉefurbo de la Ĉina Popola Respubliko, kun 13 milionoj da loĝantoj.

Pekino fondiĝis antaŭ 3000 jaroj, kaj ĝi ekzistas jam 800 jarojn kiel ĉefurbo. La longa historio postlasis al ĝi multajn kulturajn restaĵojn. La Imperiestra Palaco, la Granda Muro, la Somera Palaco, la Ĉiela Altaro kaj la ruino de la restadejo de pekinaj simioj en Zhoukoudian estis enlistigitaj kiel mondaj kulturaj heredaĵoj. Promenante en Pekino, vi raviĝos de la imponaj konstruaĵoj de la Imperiestra Palaco, kaj ankaŭ de la ĉinstilaj loĝdomoj de ĉi orienta urbo.


Pekino estas ankaŭ moderna metropolo. Preparado por gastigi la 29-ajn Olimpikojn de 2008 certe plirapidigos ĝian paŝon por internaciigo.

Pekino estas ankaŭ bona loko por butikumado. Tie estas vendejoj de varoj de famaj markoj, grandaj ĉiovendejoj kaj malgrandaj elegantaj butikoj, kaj ankaŭ bazaroj de kuriozaj antikvaĵoj, kies prezoj estas treege malpli altaj ol en aliaj landoj.

Veninte al Ĉinio vi nepre devas ĝui ĉinajn pladojn. Pekino estas ankaŭ edeno de frandemuloj. Tie estas ne nur tradicia fama plado rostita pekina anaso, sed ankaŭ bongustaj pladoj de aliaj lokoj de Ĉinio.

Kiam nokto falas, vi povas ĝui ĉinan teon en tetrinkejo kaj pekinan operon en teatro. Jam de dekoj da jaroj babilis en tetrinkejo kaj spekti pekinan operon estas ĉefa maniero de amuziĝo de pekinaj loĝantoj. Nun tetrinkejon kaj teatron de pekina opero vizitas plejparte la maljuna generacio kaj alilandaj turistoj, sed bufedejon kaj dancejon preferas gejunuloj.

Skema mapo de Pekino



Kongresejo

La 89-a UK okazos en la Internacia Konferenca Centro de Pekino, kiu situas en la Vilaĝo de Azia Sportkunveno en la norda parto de Pekino, 9 kilometrojn norde de Tian'anmen-placo en la urbocentro, 20 kilometrojn okcidente de la Ĉefurba Flughaveno kaj 12 kilometrojn oriente de la Somera Palaco.

La Internacia Konferenca Centro de Pekino estas facile atingebla per diversaj trafikiloj, la medio kvietaj kaj komfortaj. Ĝi, moderne ekipita, kun hoteloj de diversaj kategorioj kaj amasloĝejoj, vendejoj kaj aliaj servejoj en la ĉirkaŭaĵo, estas taŭga por diversaj grandaj kunvenoj kaj ekspozicioj.

Hoteloj

La regiono, en kiu situas la kongresejo, estis konstruita por gastigi la sportistojn dum la Azia Sportkunveno en 1990, kaj ĝi verŝajne servos ankaŭ por la Olimpikoj en 2008. Tial abundas tie hoteloj kaj loĝejoj de ĉiuj niveloj je vera promendistanco, fakte tute ne necesos busoj aŭ aliaj trafikiloj, krom se vi preferos loĝi en la urbocentro. Ĉirkaŭ la kongresejo, samkiel en la centra regiono de Pekino, troviĝas loĝejoj de diversaj niveloj, ĉiuj kun tre allogaj prezoj kaj ĉiuj tre komfortaj.

Ekskursoj kaj flugoj

Se temas pri la ekskursoj, la kongresanoj havos nur unu problemon: kiun elekti. Krom pluraj allogaj vizitoj en Pekino mem kaj ĝia ĉirkaŭaĵo, estos aranĝitaj ankaŭ multaj ravaj ekskursoj al famaj naturaj kaj historiaj vidindaĵoj ekster Pekino. La flugon zorgos ĉefe la Ĉina Internacia Flugkompanio (AIR CHINA), kaj la turismon ĉefe la Ĉina Internacia Turisma Servo (CITS). Ambaŭ ili pretas doni al la kongresanoj nealtprezan kaj bonkvalitan servadon.

Ĉinio multe ŝanĝiĝis post la gastigo de la 71-a UK en 1986. Veni percepti ĝian progreson kaj admiri refoje tiun ĉi antikvan kaj fascinan civilizon.



Ŝminkita rolulino en pekina opero



Retadreso pri la Universala Kongreso de Pekino
www.espero.com.cn/uk2004/



Internacia Konferenca Centro de Pekino



Halo 1 de la Konferenca Centro



Hotelo ĉe la Konferenca Centro

RENKONTOJ (daùrigo)

Kompreneble ne eblas menciï çuijn renkontojn en Esperantio . En la lasta SFS estis raporteto pri la somera semajno en Plouézec (Bretonio) ; La-Chaux-de Fonds organizas renkontojn tutjare, same pri Bouresse (vidu çiposte) kaj Grésillon somere...

Pluraj federacianoj partoprenis en oktobro internacian semajnon en Sta Suzanna (Katalunio) ; vidu raporton çiposte . Parenteze, alvenis informo pri internacia semajno en Salou en oktobro . Çu nova loko por tiu semajno aù çu temas pri du apartaj eventoj ?

Okazas ankaù, ke esperantistoj sin renkontas okaze de manifestacioj, malantaù banderoloj, kiel en novembro okaze de la socia forumo en la pariza regiono aù en Romo por Kristnasko (bildoj surekrane pri ambaù) .

Baldaù la Eùropa Unio akceptos 10 novajn membrojn kaj la nombro da oficialaj lingvoj kreskos de 11 çis 20 . Kiel povus ekzisti plurlingvismo egalrajta ? Kaj kio pri la ne-oficialaj lingvoj ? Çu la solvo estos la hegemonio de kelkaj lingvoj ? Pro tio « Bunto », manifestacio en Strasburgo por lingva demokratio en Eùropo, por konservi kulturalan diversecon kaj lingvan diversecon kun esperanto kiel pontolingvo . Ne nur partoprenos esperantistoj sed ankaù uzantoj de diversaj lingvoj en Eùropo . La 9a de majo estas çujare la tago de Eùropo...

BAUGE (49) : Centre Espéranto de Grésillon

Programmes et tarifs à 02 41 89 10 34 (sur place saison)

A tout moment : kastelo.gresillon@free.fr

Tarifs variés pour stages hebdomadaires + frais culturels
Hébergement en chambres de 1 à 4 personnes / Dortoir
Camping possible (sans électricité)

Les trois repas possibles + repas pique-nique
Fin de semaine de travaux d'entretien et rénovation
Volontaires contacter : Jeanik 02 41 27 30 33

BOURESSE (86) : Kvinpetalo


(Inf. Kvinpetalo 05 49 42 80 74 tarifs, horaires,...)

- | | |
|----------------|--------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------|
| du 17 au 21/02 | Pratique de la langue (jeunes et adultes) avec Josée Lafosse Initiation à l'espéranto pour débutants avec Marie-Hélène Désert |
| du 24 au 28.02 | Préparation à l'écrit du "Kapableco" avec Christian Lavarenne |
| du 06 au 10.04 | Acquisition et étude de deux langues avec Anna Löwenstein et Renato Corsetti |
| du 20 au 24.04 | Shakespeare et ses oeuvres avec Y. Dumoulin, B. Osulivan et M. Mme Rapley Pratique de la langue 2° degré et début du 3° avec Suzanne Bourot Initiation au Yoga avec Arlette Plutniak |

EUROPA BUNTO

Manifestacio por lingva demokratio en Eùropo

9 majo 2004



Strasbourg / Straßburg
<http://europa.bunto.free.fr>

...trans ponto ESPERANTO

Semajno en Sta Susanna (dankojn al Josée B. kaj Gilbert S. pro la informoj)

Kvin geesperantistoj de la regiono partoprenis la internacian semajnon en Sta Susanna, vilaĝeto de la Kataluna regiono. Atentu, ne diru « Hispana regiono », la loĝantoj tute ne ŝatas tion kaj ili çiam precizigas : « jo sok katalan » (mi estas Kataluno) .

La esperantista grupo (inter 50 kaj 60 homoj el 6 naciecoj) loĝis en Hotelo Mercury, marborde apud la stacidomo . La urbestro bonvenigis nin okaze de vesperfesteto . Plie, li invitis nin spekti hispanan spektaklon en « La Siesta », iaspeca kabaredo en restaùrita farmdomo, kie ni ĝojis pri folkloraj dancoj kaj kantoj . Vino, sangrio, çampano ĝojigis la etoson, despli ke en la grandega festohalo çeestis multaj naciecoj : hispana, germana, rusa, franca, itala, japana, israela, çuij loĝante en la hoteloj çirkaùe . La urbestro venis saluti nin, kaj li diris, ke baldaù en la vilaĝo nova strato nomiĝos « strato Zamenhof » . Kiel kutime dum la esperantaj kunvenoj, la etoso estis varma kaj afabla . Jorgo kaj Josée aktoris dum unu horo kaj juna esperantistino, kiu loĝas en la savoja regiono, ĝoje kaj afable helpis, rolante jurnalistinon .
Tiu internacia semajno, la unua por iuj, aspektis kiel mirindaĵo...

Amis de l'Espéranto

Espéranto France propose des cartes pour les sympathisants de l'E (idée chère au regretté Jean Gauthier), favorables à la préservation des langues et des cultures dans le monde .

Contre un versement de six euros minimum, le/la sympathisant(e) recevra une carte nominative, dont un volet sera à retourner à E°-France, et pendant trois ans (donc de 2004 à 2006) recevra une ou deux fois par an des informations sur l'activité d'E°-France . Ces cartes sont en principe destinées à des personnes non encore espérantophones . Elles permettront de tisser avec ces personnes un lien pendant trois ans et contribueront à la promotion de l'espéranto . Chaque adhérent d'E°-France a reçu trois cartes, des cartes supplémentaires peuvent être demandées au siège .

KRUCVORTOJ

1 2 3 4 5 6 7 8 9 10

| | | | | | | | | | | |
|------|--|---|---|--|---|---|---|---|--|---|
| I | | | | | | | | | | |
| II | | | | | | | | | | |
| III | | | | | ■ | | | | | |
| IV | | | ■ | | | | ■ | | | |
| V | | | | | | ■ | | | | |
| VI | | ■ | | | | | | | | |
| VII | | | | | ■ | | | ■ | | |
| VIII | | | | | | | | | | |
| IX | | | ■ | | | | | | | |
| X | | | | | ■ | | | | | ■ |


HORIZONTALALE

- I) - Empena part(o).
- II) - Vida repertuar(o).
- III) - Fama Romian(o) / Kuirherb(o).
- IV) - Trikinone plena / Eta frukt(o) / s : Por aktori de fine.
- V) - Egean(o) / Porcirkla letero.
- VI) - s : Ĉemara loko / Mikroskopa fung(o).
- VII) - Element(o) / Foje pli.
- VIII) - Rusa respublikan(o).
- IX) - Hieraù / Komponaĵo.
- X) - Elemento / Kuirherb(o).

s : sone

VERTIKALE

- 1) - Paroli por paroli.
- 2) - Radike ŝatas senbildan libron !
- 3) - Proza verk(o) / Direkti, malorde.
- 4) - Tempa malagrabl(o) / Idet... ?
- 5) - Porka teruro.
- 6) - s : Antikva vesto / Reala abstraktaĵ(o) aù abstrakta real(o) ? / Dentalo.
- 7) - Hom(a), bedaùre... / Kiel nuntempa novaĵo.
- 8) - Fable best(o) / Sataj.
- 9) - Teatra amatino / s : Mara ringo.
- 10) - Gaso.



BOPARO

Solvoj de la numero 129a :

Horizontale : I. Palimpsest II. Apostolaro III. Lob.Ekip. IV. Ilek. Idolo . V. Notario . Ag . VI. Dg. Nei . Hnr . VII. Regalit . Ka . VIII. Otari . Ok . IX . Misi . Krani . X . Ektoplasmo .
Vertikale : 1. Palindrome . 2 . Apologetik . 3 . Lobet . Gast . 4. Is . Kanario . 5 . Mtr . Reli . 6. Po . Iiii. Kl . 7 . Sledo . Tora . 8. Eako . Kas . 9. Srilank . Nm . 10 . Topografio .

La redaktoro pardonpetas pro la escepta malfruo de tiu-ĉi bulteno . Sinsekve estis problemoj : tekstoj ricevataj post la limdato, problemoj kun Wanadoo, paneo de la printilo, forpaso de familiano, ktp . Espereble poŝtistoj ne strikos kaj alportos al vi la bultenon rapide...Pro tiu malfruo kelkaj anoncoj ne plu estas aktualaj ...Male estas prokrastitaj anekdotoj, teksto de peticio, informoj pri EDE (listo por la eùropa baloto), ktp .
Lastminute alvenis informo pri la vizito kaj prelego de Flavio Rebelo (Brazilano) en Montpellier la 15an de februaro posttagmeze pri la projekto de interreta televidkanalo en esperanto (vidu la lastan SFS p.10) . Por la venonta bulteno, kiu devas nepre aperi antaù la federacia kongreso de dimanĉo, la 25a de Aprilo en Narbonne (urbdomo, salono de la geedziĝoj), bonvolu sendi viajn kontribuojn plej malfrue ĝis la 28a de marto . Anticipan dankon !
Jean Hénin- Beaugard- Rte de Montcayroux 48500 La Canourgue. Telefono/faksilo : 04 66 32 86 36
jean.henin@wanadoo.fr (atentu la modifeton en la retadreso) .